

Esperanta Vorto

JULIO 13 AŬGUSTO 1952

CIRKULERO DE ESPERANTA-RONDETO ĈE „OSVĚTOVÁ BESEDA“ EN LANŠKROUN

ADIAŬA DANKESPRIMO EN ROŽNOV pod Radhoštěm

La 25-an de julio 1952.



Granda estas por mi la honoro,
ke mi povas el sincera koro
danki al amataj profesoroj
por la al ni oferitaj horoj,
por sugestoj kaj por idealoj,
kiujn ili en diversaj skaloj
donis al ni en Rožnov-aj haloj.

Ni – lernantoj – estis diversaĝaj,
kelkaj spritaj, kelkaj eĉ malsaĝaj
ne konantaj eĉ „aspekton verban“,
meritantaj nur manĝaĵon herban –
sen kompreno por ide´ interna,
por signifo ĝia poreterna.

Estimataj niaj profesoroj,
jen akceptu laŭ kutimaj moroj
varman dankon de ni – „junularo“
en mil naŭcent kvindek dua jaro.

Ni ĉi-tagojn ofte rememoros
kaj por Esperanto eklaboros
per la fortoj nove akiritaj,
al la malhelpaĵoj ĉiam spitaj,
kiam ni al hejmoj fordisiros
kaj en rememoroj ofte miros
ne nur pri ripozo ĉarma, bona,
ne nur pri l´ beleco regiona,
ravigantaj: Radhošť, Rožnov, montoj,
sed eĉ pri riĉegaj lingvofontoj.

Niaj koroj entuziasmiĝis,
maljunuloj tie ĉi juniĝis,
ili sidis en diversaj kursoj
similante al kvietaj ursoj.

Multaj – fariĝinte dudekjaraj –
konatiĝis kun la dekokjaraj
samideaninoj tre rapide
kaj rigardis ilin am-avide.

La fotografado – granda peno! –
Kelkaj montris sin en ĉirkaŭpreno
al fotografisto kriz-momente –
sekvojn ili postbedaŭros pente.

Ni memoros ne nur pri la kursoj,
sed eĉ ofte ankaŭ pri ekskursoj,
kiujn ni aranĝis kun vi kune,
ĉar por ĉiuj estis oportune.





Mi jam finas mian dankesprimon,
ĉar mi havas ekzamenan timon,

kiel eĉ ceteraj kandidatoj
forgesintaj multon de la datoj,
kiujn vi al ni dum dek kvar tagoj
penis enkapigi – kaj plagoj! –
kaj mi en mon' de ni ĉiuj fine
dankas al vi varme kaj inkline.

Ankaŭ apartenas nia danko
al organizintoj, ĉar sen manko
ili ja prizorgis diligente,
ke ni fartu bone korpe, sente:
Karaj: sinjorino Vondroušková
samideaninoj Skařupová,
Strakošová, Kyselý kaj multaj
en laboroj siaj bonrezultaj
multe helpis al la kontenteco
ĝoja kaj samideaneco.

Nun denove ĉiuj ni disiros,
kaj amikoj hejme certe miros,
kiam ni rakontos pri la spertoj,
pri konsiloj kaj eĉ pri avertoj,
pri beleco de Beskidaj montoj,
pri la Beĉva kaj pri ĝiaj pontoj,
pri perdita mono kaj ŝlosilo
pri la bona esperanta stilo,
pri la travivaĵoj ravaj, ĉarmaj,
kantoj, ludoj kaj karesoj varmaj,
do pri ĉio, kion ni ekkonis,
kion al ni niaj kursoj donis.

Mi finante mian dankesprimon
devas al ĝi doni iun limon,
tiukaŭze vokas mi el koro:
„Vivu Esperanto! Gloro! Gloro!“

Verkis JUDro Josef Fousek,
eksadvokato en Přelouč.

UTILO AŬ MALUTILO:

Ofte vi aŭdas en via ĉirkaŭaĵo jenan riproĉon kontraŭ Esperanto: „Ho, vi Esperantistoj estas tre malmultaj. 4 milionoj ne estas tiom multe relative al la tuto homaro. Tiu ĉi areto perdiĝas inter la homoj, ĉar ĝi estas dissemita en la tuto mondo!“

Sed se vi pripensos ĉi-temon, vi povas konstati, ke la stato ne estas tiom malesperiga, kiel ŝajnas. Kaj mi diras, ke en la malmulteco estas ankaŭ ioma utilo.

Se vi vojaĝas nun ien en fremdlandon, vi certe malpli facile interkompreniĝos, sed ĉiu, kiun vi komprenas, estas via amiko. Kaj tiu ĉi amiko zorgos pri vi vere patrinece, ĉar li estas via samideano - kunbatalanto por la sama celo. Kaj da tiaj amikoj estas 4 milionoj kaj ili estas en la tuta mondo.

Jen la utilo de malmulteco. Ni sentas nin pli familie kaj laŭ tio ni ankaŭ interrilatas.

Sed imagu tian situacion:

La tuta mondo estas esperantigita. Preskaŭ ĉiu homo parolas Esperante. Tiel parolas ĉiuj okupituloj ĉe fervojoj kajren ĉiuj oficejoj. Ĉiuj surskriboj ĉe fervojo, en hoteloj kaj surstrate estas dulingvaj: en Esperanto kaj nacia lingvo. Esperanton oni instruas eĉ en lernejoj kaj en la mondo disvolvigas viglaj kulturaj interrilatoj inter la nacioj.

Ideala stato, ĉu vere? Kaj tiam vi decidiĝos veturi ekzemple en Francion. Post plenumo de necesaj pasportaj kaj similaj aferoj ve fine vojaĝas. Vere vi dŭm la vojaĝo mirinde facile interkompreniĝas. Sed malgraŭ tio vi sentas vin fremda. Kial? Ĉiu homo komprenas al vi, sed neniu estas via amiko. Samideaneco ne estas plu, ĝi forpasis. Ĉiuj homoj, eĉ se ili parolas Esperante, estas por vi simple fremdaj.



Laŭ tiu ĉi meditado oni povas opinii, ke penante por disvastigo de nia bela lingvo ni malutilas al ni, ke ni jam bonstatis nun pli ol post esperantigo de la mondo. Sed tio ne estas vero. Celo de nia laboro kaj klopodo ja estas esperantigi la tutan mondon, sed ni kun Esperanto devas disvastigi ankaŭ internan ideon de Esperanto-frateco kaj amikeco inter la homoj. Ni ne disigu solan lingvon de ĝia ideo. Kaj nur tiam validos la devizo:

„Ju pli multaj estos esperantistoj, de pli multaj estos niaj amikoj. Kaj se la tuta mondo esperantiĝos, estos do tuta homaro nis amikaro.“

Do ne forgesu, ke Esperanto havas noblan internan ideon. Sen ĝi Esperanto estus nura ilo kaj tian ni ĝin ne volas.

ANKRO

EJ raportas

HODONÍN - / Esperantigita letero: /

Estimata sinjoro Svačina!

Ni dankas por la poŝtkarto kaj prospektoj / Doksy, Poprad /. Tuj ni akiris interesantojn en nia entrepreno en Hodonín.

Ni estas jam 7, kiuj vous lerni Esperanton. Varbadon en rondeton de esperantistoj / kiel ni ekonomiĝis / ni faros ankoraŭ per entreprena disaŭdigilo /.

Ni volas plu profuntigi niajn sciojn, se ni jam iajn havas, kaj tial ni petas vin, ke vi sendu al ni kelkajn lernolibrojn.

Ni dankas pro via afableco. Je revido !

Boža Poláčková, Jihomor. armaturka, Hodonín

Eva Bařinová, Havlíčkova 26, Hodonín.

No ĝojas, ke nia rondo plimultiĝis je 7 pluaj gesamideanoj, kies intereso pri nia lingvo ŝajnas esti efektiva. Ni salutas vin kaj deziras sukceson en via agado. Nur kuraĝa antaŭen! Red.

LITOMYŠL – Antaŭ kelkaj tagoj venis ĝojigita letero el Litomyšl, kie 4-5 junaj samideanoj eklaboris kaj kreis rondeton. Ne ĉesu nian noblan ideon kaj agu, junularo de malnova Litomyšl! Ni certe helpas al vi.

NOVÉ MĚSTO NAD METUJÍ – En pasinta lernoĵaro ni fondis Esperantan rondeton ĉe ZS ROH de n.e. Chronotechna. De la 1-a de junio i estas kiel Junularo kun 20 membroj. Ĉar dum ferio ni ĉiuj disiris, ni interrompis nian agadon kaj kun nova entuziasmo ni komencos denove labori en septembro.

D.Berudt.

Ludo por viaj kunvenoj

RIMOJN AL VORTOJ!

Ludantoj sidas ĉirkaŭ la tablo kaj la unua komencas la ludon. „Mi estas poeto Rimsputulo, diru al mi rimon al vorto floro!“ Poste li montros iun ludanton kaj tiu ĉi devas diri ĝis tri sekundoj vorton kun rimo al - floro - . / Do: ploro, koro, horo, doloro. Se li ne scias aŭ diros eraran rimon, li ne ludu plu aŭ donu garantiaĵon. Se li respondas ĝustan vorton, li mem poste demndas jun alian. En unua okazo demandas denove la unua.

Muziko kaj teksto: Luboš Kretzschmar Kanto de Esperanto-Junularo Lanškroun.

Gaje

Tra la mondo kanto sonas, kiel ŝtormo vente bruas de kunligaj fortoj unu
 Ni forigos la malamon, de la mondo la malsanon, amikigos mondon sen
 ri-
 voĉ. - Lumon donas nia verda stel', vent' favore blovas por la vel'.
 proĉ. -

Esperanto ĉiujn homojn, la naciojn kaj terzonojn unuigas por la nobla
 cel'. - Frata sent', gaja viv' ĉiam regas inter ni, vivu ĝi,
 floru ĝi por eterna harmoni'. - Verda estas la kolor',
 kiun portas kun honor' ĉi-an la Junular' de Lanškroun. -
 Flugas tra tuta mond', vokas vin al nia rond'-ideal' de homar',
 kiun semas nia Junular'.

Verda rondo

Muziko kaj teksto:
 Luboš Kretzschmer

Kanto de Esperanto-Junularo Lanškroun

Tra la mondo kanto sonas, kiel ŝtormo vente bruas de kunligaj fortoj unu voĉ'.
 Ni forigos la malamon, de la mondo la malsanon, amikigos mondon sen riproĉ'.
 Lumon donas nia verda stel', vent' favore blovas por la vel'.
 Esperanto ĉiujn homojn, la naciojn kaj terzonojn unuigas por la nobla cel'.
 - Frata sent', gaja viv' ĉiam regas inter ni, vivu ĝi, floru ĝi por sterna harmoni'.
 - Verda estas la kolor', kiun portas kun honor' ĉi-an la Junular' de Lanškroun.
 - Flugas tra tuta mond', vokas vin al nia rond' – ideal' de homar', kiun semas nia Junular'.

DEMOSTENO

Demosteno estis la plej granda greka oratoro. Li perdis la patron, kiam li estis apenaŭ sepjara. Foje li aŭdis oratoron kaj estis ravita per la bela parolado. Li tuj decidis ankaŭ fariĝi iam oratoro. De tiu tago li ne partoprenis plu en la ludoj kaj dediĉis la tutan al legado, skribado kaj parolado. Kiam li jam estis plenaĝa, li foje preparis belan paroladon kaj diris ĝin antaŭ popola kunveno. Sed oni fajfis lin kaj ŝajnis, ke lia tuta penado estis vana. Malĝoja li revenis hejmen. Amiko kuraĝigis lin al dua provo. Li laboris ankoraŭ pli diligente kaj pli flue diris la paroladon. Sed, ho ve, oni ree ridis lin. Kaŝinte la vizaĝon en la mantelon, li iris malespera hejmen. Alia amiko vizitis lin kaj montris al li la mankojn kaj erarojn de lia parolmaniero. Demosteno havis kiel oratoro tri ĉefajn mankojn: unue li parolis tro mallaŭte, ĉar li havis malfortan bruston: li parolis malklare kaj kelkajn konsonantojn li tute ne povis elparoli, ekzemple R: fine li havis malbonan kutimon, ke li levis la ŝultrojn post ĉiu dirita frazo. Sed kiel forigi tion? Demosteno ne perdis la esperon. Kion oni volas, tion oni povas.

Por forigi la bruston Demosteno suriris ĉiutago plej krutan montojn aŭ iris al la bordo de l' maro, kiam la ondoj bruegis, kaj penis per sia voĉo superi ilian muĝon. Por bone elparoli R kaj kelkajn aliajn sonojn, li metis malgrandajn ŝtonojn sub la langon kaj tiel parolis. Por forigi la kutimon levi la ŝultrojn, li pendigis super la ŝultro glavon, kiu vundis ĝin ĉiufoje, kiam ĝi leviĝis. Fine li tondis la harojn mallonge: li ne povis eliri kaj la tutan tempon devis dediĉi al siaj studoj. Per tiaj senĉesaj ekzercoj kaj penoj i fine fariĝis la plej granda oratoro de l' mondo. /Dro Kabe /

----- AL NIAJ GESAMIDEANOJ -----

Plimulto da homoj havas siajn planojn kaj celojn kaj kune ankaŭ klopodojn, malhelpojn, sed ne ĉiuj havas saman karakteron. Unuj superas aperintajn ĝenojn facile aŭ malfacile, aliaj ne scipovas venki atkon de sorta malfavoro. Ankaŭ inter esperantistoj estas tiaj malfortuloj kaj timuloj kaj por ili ni reprenis artikoleon pri Demonsteno. Li estas vera modelo de persisteco kaj kredo je fina sukceso.

Nia ĉeĥoslovaka esperantista movado certe estas vivkapabla, sed por venonta tempo ni devas ankoraŭ plifortiĝi, por ke neni ekster frapo endanĝerigu nin. Ni povas esti konsciantaj pri ĉio, sed ni ne povas perdi l' esperon, kuraĝon kaj kuntenemon. Sentime ni atendu proksiman estontecon, ĉar nia dua labor-roto – junularo – vivas. Do kuraĝe, pioniroj! -
ĉiuj de la faro viroj -
fosu vian sulkon vere
kaj vi venkos sendanĝere!

LA LINGVO

SUFIKSO - END - JAM APROBITA.

AKADEMIO DE ESPERANTO antaŭ nelonge aprobis sufikson – end - , kiu jam estis iun tempon, sed malofte. Signifo de tiu sufikso estas generale konata / io devas esti farita /. Ekzemploj:
Tio estas farena, ĉar la patro tion ordonis.
Por nova lernoĵaro estas aĉetendaj ĉi tiuj libroj: . . .
Tiu programo estas vizitenda por ĉiuj membroj de ĈAJ.
Tio certe estis sorta okazendo.

ANONCETO:

Kiu al mi sendos 5 bildkartojn de sia urbo, ricevos tuj 50 diversajn poŝtmarkojn de Germanio.

-
Hans Wanjura, 23 Harpenfeld, Post Bad Essen, Germanio.

ĈU VI DEZIRAS KORESPONDI KUN ĈEĤOSLOVAKIO?

Nepre skribu al nia redakcio! Anoncojn ni publikigas senpage. Vian leteron aŭ poŝtkarton kun korespondpeto ni ankaŭ povas rekte transdoni al ĉeĥoslovaka samideano aŭ samideanino.

SCIIGO EL JAPANIO:

. . . En nia lando ni intencas organizi la tutlandan organizon de japanaj esperantistoj. Eble ĝi funkciigos de tiu ĉi septembro aŭ oktobro. Kaj antaŭ ĝia fondiĝo, ni junaj pacemaj esperantistoj intencas organizi unu kamaradecan rondon de pacdefendantaj esperantistaj junuloj . . .

M.Kiyoshi

PLI OL 300 GESAMIDEANOJ partoprenis somerajn Esperanto – kursojn en Rožnov p/R, Doksy kaj poprad. Ĉu ne sukceso?

ELKORE NI DANKAS al tiuj, kiuj subtenis preson de ĉi tiu cirkulero: Antonín Kodýtek - Nové Město n/Met. - Krčín, Fran.Fara – Bezno, Fr.Pytloun – Stráž n/Nisou, Ladislav Plavec - Hřiměždice u Dobříše.

ORGANIZAJ SCIIGOJN de tutŝata signifo vi ĉiam trovos sole en „Junularo, agu!“ de Gottwaldov, kiu estas redaktata de s-ano Rudolf Němec / Na včelíně 1660, Gottwaldov – Zlín /.

! Senpaga kaj laŭbezona informilo de Esp. - Junularo Lanškroun. !
! Red. - adm.: Jan Werner, Gottwaldova 65, Lanškroun, Ĉeĥoslovakio !
